# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4 Aprilo, 2012


*Kara leganto, jam denove venis tempo renkonti vin sur paperaj kaj elektronaj paĝoj de nia bulteno, informi vin pri interesaj, utilaj kaj, iam, malĝojaj eventoj en vivo kaj agado de niaj samsocietanoj. Malfermas la numeron anglujaj vojaĝimpresoj de s-ro B. Stigers, dum la prelego en la Societo estis montrataj dekoj da interesaj fotoj. Sekvas ĝin malgaja novaĵo pri la forpaso de R. Miller. Poemo de la fama angla E-poetino M. Boulton servas kiel spiritaldono al la artikolo kaj al la nekrologo.*

*Kaj fine – pri la solenaĵoj okaze de 100-jara jubileo de T. Sekelj.*

*Restu kun ni, la estimata Leganto!*

–La Redakcio

## Anglujaj Vojaĝoj de B. Stigers



Dum la marta kunsido prelegis s-no Bruso Stigers (*prononcu kiel* brŭs stajgers), kiu montris fotojn registritajn dum pluraj vizitoj al Anglujo, kie li soldatservis flugarmeane inter Majo 1952 kaj Aŭgusto 1955. Li gajnis tiutempe multajn geamikojn kaj dum 60 jaroj ĉiam konservis tiujn rilatojn freŝaj. Malgraŭ loĝado en Anglujo li ne estis turismulo. Ofte li vizitis Londonon por aŭdi operon aŭ vidi baledon, per kioj li renkontis interesajn personojn kaj trovis homojn pli atentindaj ol lokoj. Li fianĉiĝis, sed la fraŭlino ŝanĝis sian opinion. Tamen li restis aminda al ŝiaj gepatroj, kun kiuj li regule korespondadis.

En 1971 li reiris al Anglujo kun sia tiama edzino, kaj ili pasigis tri noktojn ĉe la loĝejo de la virino, kiun li nomas sian preskaŭan bopatrinon. Pro tio li kun la edzino kaj la preskaŭa bopatrino vizitis la eksfianĉinon por teo, tiel renkontinte ŝian edzon kaj du filojn. Kiam mortis la preskaŭa bopatrino, ŝia naskiĝtaglibreto trafis la manon de ŝia filino, kiu salutis lin okaze de 60-a naskiĝtago. Tiel komenciĝis daŭra korespondado. Kaj kiam li anoncis sian planon viziti Anglujon dum Majo 2011, la eksfianĉino invitis lin tranokti ĉe sia domo, do dum vizito li noktumis kvinfoje ĉe la domo de ŝi kaj ŝia multjara edzo. Ili loĝas en XVIII-jarcenta domo (*vd foton*).

Ĉar li estis dum multaj jaroj lernanto de Latino, li havas interesegon pri Romiaj antikvaĵoj, kaj dum la plej lastatempa vizito li pasis kelkajn tagojn por rigardi la ruinojn de la Muro de Hadriano (II jc), kio estis tre interesa al li. Unu fortikaĵo enhavas la plej bonan ruinon de Roma banloko, kio havis saŭnon, vaporĉambron, k.t.p (*vd foton*).

Nun – mallonge pri la E-agado: Bruso ektrovis E-on en 1954, legante libron de Mario Pei *Languages of the World*. Tamen, tiutempe li havis intereson pri la franca lingvo. Dum la soldatservo li aĉetis longludajn diskojn kun registritaj operoj, per kiuj li eklernis kanti multajn operojn germane, france kaj itale. Li profesie debutis kiel oper-kantisto en 1960. Poste li ne serĉis informon pri Esperanto, sed en 1966 li petis instrupaketon el la E-biblioteko, tiam in Medisono, Viskonseno. Post dek tagoj li ekserĉis korespondamikojn kaj tra jaroj li havis multajn korespondamikojn. En 1996, post 30-jara korespondado, li vizitis ĉeĥan amikon, kio estis unu el la plej belaj spertoj de sia vivo. Dum multaj jaroj li korespondis kun fama komunisto el Ruslando. –*Araneo*





## Memore al Riĉjo Miller (1966-2012)



Komence de Marto forpasis nia viskonsina membro, ĝisosta Esperantisto, lerta preleganto Richard D. III "Rick" Miller. Li naskiĝis la 25an de Decembro, 1966, magistriĝis kiel elektronika inĝeniero, estis sperta programisto. Ankaŭ – sindona patro por siaj kvar infanoj: Alex, Valerie, Daniel and Joe. Krome, Rikardo senlime ŝatis nian kara lingvon, ofte elpaŝis en la Esperanto Societo de Ŝikago, multe kontribuis por E-Vikipedio.

Restu vi en paco, estimata nia samideano… *–Marjorie Boulton*

## Finfine



Altestimata, ĉu se mi unue
mortos, vi venos en la lasta horo
kaj min brakprenos, por ke mi malfrue
feliĉu milde apud via koro?

Ĉu vi permesos, kiam lasta spiro
forflugos, brule sekos mia haŭto,
ke mi vin kisu, ne plu pro deziro,
sed kiel lasta preĝo, lasta laŭdo?

Miraklo sur la kompatema brusto
povos okazi, tute senintence:
vi eble revivigos min kurace.

Se ne, vi povos diri dum la flustro,
kion vi faros poste, kondolence:
"Ŝi estas morta ... sed ŝi mortis pace ..."

## Tibor Sekelj – 100, Subotica, Serbio, 18-20.05.12

Urbo Subotica kaj la loka Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" komune organizas manifestaĵon omaĝe al la centjara datreveno de la naskiĝo de Tibor Sekelj, kiu okazos inter la 18-a kaj 20-a de majo ĉijare.

Kerno de la manifestaĵo estas *Ronda Tablo* **Vivo kaj verko de Tibor Sekelj**, en kiu sian partoprenon anoncis 28 personoj, kun 30 prelegoj, el dek landoj. Kelkaj el inter ili ne estos surloke, sed ili sendi/o/s siajn referaĵojn kiuj estos prezentotaj, dum kelkaj prelegos pere de interreto.

En la programo de la manifestaĵo estas ankaŭ literatura vespero dediĉita al la verkoj de Tibor Sekelj, du ekspozicioj – *Centjaro de Tibor Sekelj*, kies aŭtoro estas Mile Tasić el Subotica kaj *Pupoj*[2], kies aŭtoro estas Ivan Špoljarec el Zagreb – inaŭguro de memortabulo sur domo kie loĝis Tibor Sekelj, eldono de libro dediĉita al Tibor Sekelj (kaj lia etnografia kolekto), ktp. Krom tio, okazos kelkaj aliaj programoj, kiujn preparas kulturaj institucioj en Subotica.

Ĉiuj programoj de la manifestaĵo estas publikaj. Krom tio gravas, kaj ni tion substrekas, la malfermon de la manifestaĵo, kaj la kvar sesiojn de la *Ronda Tablo* oni povos pere de interreto spekti en la tuta mondo, uzante la eblecon de tielnomata (angle) *video streaming*, pere de adreso www.subotica.rs. Ek de la 15-a de majo je tiu retejo oni trovos ankaŭ la **skajpan** adreson pere de kiu oni povos aktive partopreni la diskuton dum la sesioj de la Ronda Tablo. *–OK*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Roberto Stalzer
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

24an de Aprilo – Centjariĝo de E-Biblio k Tago de kirila skribo (V. Pajuk)

22an de Majo – Gvatemalo per okuloj de Marko Shafroth

24an de Junio – Pikiniko okaze de 100-jariĝo de IL

24an de Julio – Solena kunsido okaze de 125-a datreveno de IL